

Paul Gerhardt,  
Commit whatever grieves thee

*tradukita de Richard Jordan*

Argiope-informo:

La aspekto de tiu ĉi versio estas barita.

Supozeble la aŭtoro decidis tion.

...

Paul Gerhardt,  
Translasu ĉion, kio

*tradukita de Manfred Ratislavo*

1. Translasu ĉion, kio  
Vin premas en la kor'  
Al nia kara Dio,  
Foriĝos la dolor'.  
La patro, kiu movas  
La nubojn super ni,  
Li certe vojon trovas,  
Sur kiu iros vi.

2. Al Dio vi nur fidu,  
Kaj bone fartos vi ;  
Sur Lian verkon vidu,  
Miriga estas ĝi.  
Vi ne devigos Dion,  
Eĉ se vi streĉas vin;  
Atingos vi nenion,  
Se vi ne petas Lin.

3. Ho patro, kio bonas  
Por nia hom-natur',  
Vi certe tion konas,  
Ni kredu tion nur.  
Kaj kiun Vi elektas,  
Kreskigas Vi fortul',  
Kaj tiun Vi protektas,  
Ho saĝa Eternul'.

...

4. Ne mankas al vi vojo,  
Kaj ne la rimedar' ;  
Ja estas por ni ĝojo  
Kaj beno Via far'.  
Labor' kaj verko Via  
Tre gravas ja por ni ;  
Ho kara patro nia,  
Ne devas halti ĝi.

5. Kaj kvankam kontraŭstaras  
Diabloj tie ĉi,  
Sendube Dio faras  
Nur kiel volas Li.  
Jes, kion Li planadas  
Kaj kion volas Li,  
Finfine ja venadas  
Alcele tio ĉi.

6. Esperu, ho animo,  
Ne malesperu vi,  
Restadu vi sen timo,  
Gvidadas vin ja Di'.  
Se vin malbon' insidos,  
Ne iru de la voj',  
Vi certe iam vidos  
La sunon de la ĝoj'.

...

...

7. Nun bonan nokton diru  
 Al zorgo kaj dolor'!  
 Ĝin lasu, ĝi foriru  
 Por ĉiam el la kor'!  
 Vi ne konduki ĉion,  
 Ne zorgu por la bon'!  
 Vi lasu regi Dion.  
 Li sidas sur la tron'.

8. Lin, Lin nur lasu fari!  
 Li estas saĝa reg'.  
 Vi devas mire stari  
 Adore kaj en preg'.  
 Ĉar Li laŭ Sia deco  
 Ĝin gvidos al la fin',  
 Kaj la kor-premiteco  
 Lasinta estos vin.

9. Li eble atendigos  
 Dum kelka tempa vin,  
 Kaj eble Li ŝajnigos  
 Indiferenta Sin.  
 Kaj ŝajnos, kvazaŭ volos  
 Li ne plu savi vin,  
 Neniam vin konsolos,  
 Retiros de vi Sin.

...

...

10. Sed se fidele restos  
 Vi al la patra Di',  
 Savita de Li estos  
 Neatendite vi.  
 Se malgraŭ senkulpeco  
 Suferi devas vi,  
 De l' peza ŝarĝiteco  
 Vin liberigos Li.

11. Ho ĝoju, fidelulo!  
 Donita de l' Sinjor'  
 Ja estas al piulo,  
 Al vi la venka glor'.  
 Folion de la palmo  
 Mem donos Li al vi;  
 Vi kantos laŭ la psalmo,  
 Dankante nur al Li.

12. Ho, lasu esti fino  
 De nia mizereg',  
 En via patra sino,  
 Eĉ malgraŭ sufereg',  
 Restadas ni surtere  
 Kaj post la vivo-fin'  
 Ĉe Vi ni estos vere;  
 Vi ja akceptos nin.

...

...

*Traduko de la Germana poemo “Befiehl du deine Wege” de PAUL GERHARDT (\*1607-03-12 – †1676-05-27) en la Anglan de Richard Jordan.*

*Arg-546-1099 (2010-06-27 12:11:35)*

*Tiu ĉi angligo troviĝas en la retejo <http://www.musicanet.org/robokopp/hymn/commitwh.htm>.*

*Traduko de la Germana poemo “Befiehl du deine Wege” de PAUL GERHARDT (\*1607-03-12 – †1676-05-27) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04).*

*Arg-546-1098 (2010-07-03 14:37:37)*

*La unuan, la duan kaj la kvinan strofojn mi, Manfred Retzlaff, korektis laŭ konsiloj de s-ro pastro Albrecht Kronenberger [Albrecht.Kronenberger@t-online.de].*